

HISTORIO PRI LA URBO "TROYES"

Praepoke en la regiono de Troyes (Suda Ĉampanio) vivis gaŭla tribo nomita "Tricasses" (prononcu "Trikas")

La Romianoj konkeris tiun regionon ĉirkaŭ la jaroj 30 aŭ 35 antaŭ-Kristo, kaj dum la konstruado de la Romana-vojo de Milano ĝis Bulonjo-ĉe-maro (22 kaj 21 antaŭ-Kristo), la ĉefurbon de la "Trikasoj", ili nomis "Aŭgusto Bonna Tricassium". Post kelkaj jarcentoj, ĝi nomiĝos "Troyes" (Prononcu: Troa).

En la jaro 451 post-Kristo, la "hunaj" triboj de Attila (El Mongolio) estis haltigitaj ĉe la pordoj de Troyes dank'al episkopo nomita Sankta Luo.

En la 892-a la "Normandaj" triboj (Vikingoj el Skandinavio) fajre detruis la urbon.

Dum la 9-a kaj 10-a jarcento regnas la Grafoj de Troyes kaj, poste en la 12-a jarcento, Troyes fariĝas la ĉefurbon de la provinco "Ĉampanio". En tiu epoko, Troyes estis konata tra la tuta Eŭropo dank'al siaj famaj "Foiroj de Ĉampanio".

En la jaro 1119, la nobela-kavaliro Hugues de Payns (prononcu "Ug d' Pan) kreas la "Ordenon de la Templanoj" (Ordre des Templiers) tiu-ĉi estas religia ordeno de militistaj monaĥoj dum la "kruc-militiroj" (kampanjoj en mezoriento).

En tiu epoko, Troyes estas tre fama kultura urbo dank'al Chrestien de Troyes (verkisto) Thibaut IV (kanzonisto) Geoffroy de Villehardouin (verkisto) Jean de Joinville (historiisto) k.t.p.

La katolika Papo Urbano la IV-a naskiĝis en Troyes, en la jaro 1185, la preĝejo Urbano la IV-a estis konstruita danke al li.

En la jaro 1284 la graflando de Troyes, ne plu estas aparta provinco, sed ĝi fariĝas parton de Francio post la edziĝo de Jeanne de Navarre (lasta grafino de Ĉampanio) kun la estonta franca Reĝo Philippe IV le Bel.

La 21-a de majo 1420, la reĝo Charles VI (Karlo la VI-a) subskribas en la urbo, traktadon kun la angla reĝo Henri V (Henriko V) (traktado de Troyes). Tiu traktado (oni ĝin nomas "la hontinda traktado") promesas la Reĝolandon de Francio al la Reĝo de Anglio, kaj la edziniĝon de la reĝa filino (Catherine de France) kun la angla reĝo. Tiu geedziĝo okazis la 2-an de junio en la preĝejo Sankta Johano de Troyes. Tiu malbona traktado estis la kialo de la milito inter francoj kaj angloj, nomita: "La centjara milito".

La 9-a de julio 1429-a la militistino Jeanne d'Arc (Johanina d'Ark) post batalo kontraŭ la angloj, liberas la urbon.

En la 15-a kaj 16-a jarcento aperas konataj skulptistoj kaj pentristoj (Francois Gentil, Pierre Mignard, Nicolas Mignard, Francois Girardon, Linard Gontier k.t.p.) en tiu epoko, Troyes fariĝas artan urbon ĉefe pro la vitraloj, oni ĝin nomas "La sankta urbo de la vitraloj". Ili ornamas la multajn preĝejojn de la urbo

Ĉar multaj riveretoj kaj la riverego Seine fluas tra la urbo, aperas ankaŭ novaj fabrikejoj kaj metiejoj: tanindustrioj, trikotistoj, tinkturistoj, presistoj, paperfabrikistoj k.t.p.

En la 1524-a gravega brulego detruas preskaŭ la duonon de la urbo, ĉar la domoj estas ligne konstruitaj.

Ĉirkaŭ la jaro 1560, la ribelantoj kontraŭ la reĝo, kies estro estas la Duko de Guise, regnas en la urbo. La 30-a de majo 1595-a, la reĝo Henri IV (Henriko la IV-a) sieĝas la urbon, kaj li ĝin liberas.

Dum la 17-a kaj 18-a jarcento la graveco de la urbo malpliiĝas, ĉar la ĉefaj decidoj estas faktoj de la reĝa potenco, kies sidejo estas en Parizo. Dum la regno de Louis XIV (Ludoviko la XIV-a), la urbo enhavis 27.000 loĝantojn, kaj nur 13.000 dum la regno de Louis XV.

En la jaro 1620, naskiĝis Marguerite Bourgeoys kiu, kun Chomedey de Maisonneuve kreis la urbon Montreal en Kanado.

En la 1745-a aperas la unuaj teksaj fabrikmaŝinoj, tiel Troyes fariĝis "la ĉefurbon de la teksaĵoj".

La imperiestro Napoleono la 1-a lernis en la milit-lernejo de Brienne (proksime de Troyes), sed en la jaro 1814 li perdis batalon kontraŭ la prusoj kaj la rusoj, norde de la urbo. Tiu, pro tio, multe suferis.

La prusa armeo okupacias la urbon dum la 1870-a

Dum la unua mondmilito (1914-a/1918-a), la germana armeo estas haltigita je 30 km norde de Troyes.

Dum la dua mondmilito (1939-a/1945-a), la germanoj okupacias la urbon dum 4 jaroj. Dum la jaro 1945 kelkaj ĉirkaŭaj kvartaloj estis detruitaj per bomboj, sed ne la centra kaj malnova parto de la urbo.

La 26-a de aŭgusto 1944, la usona Generalo Patton, liberigas la urbon. Tiu batalo de Troyes per tankoj fariĝis modelon en la milit-lernejoj de Usono.

Nun, Troyes estas plaĉa kaj industria urbo kun cirkaŭ 150.000 loĝantoj.